JARO 2016 #3

ESPÉRANTO NORD
www.esperanto-nord.org

18 JUL 2016

# NORDA ✫ KURIERO

## Ni jarkunvenis en Araso la $1^{an}$ de majo!

La Nordfrancia Esperanto-Federacio jarkunvenis dimanĉon la $1^{an}$ de majo en Araso. Post aprobo de la agada kaj financa raportoj, la Asembleo elektis novan Komitaton el 15 membroj por la venontaj tri jaroj. El ĝi estiĝis nova Estraro, kiu konsistas jene: prezidanto Michel Dechy, vicprezidantino France Valet, ĝenerala sekretariino Katja Boen kaj kasisto Daniel Calvos.



Post la kunsidoj venis la tempo por komune manĝi en restoracio. La partoprenantoj fine vizitis la libran foiron *Salon du livre d'expression populaire*, kie staris Esperanto-budo.

## En Lillo ili ekzameniĝis kaj ludis!



La Federacio organizis la ĉiujaran ekzamensesion de Franca Esperanto-Instituto (FEI) sabaton la $18^{an}$ de junio en Lillo (MRES). Trapasis 2 homoj la unua-gradan ekzamenon, kaj 3 la duagradan.

Poste, la Lilla klubo okazigis samloke "someran feston" kun aperitivo kaj ludoj: partoprenis ĉ. 15 homoj. Pluraj vespermanĝis en apuda restoracio.

## Disertis Manuela pri Esperanto




Manuela Burghelea estas rumana studentino, kiu studis en la Lilla universitato dum la ĵus finiĝinta lernjaro. Ŝi disertis pri Esperanto sub la titolo: *L'espéranto, entre idéaux universels et pratiques culturelles locales. Les cas français, belge et brésilien* (Esperanto, inter universalaj idealoj kaj lokaj kulturaj praktikoj. La ekzemploj franca, belga kaj brazila). Ŝi brile kaj sukcese prezentis sian disertaĵon al ĵurio la $12^{an}$ de julio. Ni gratulas ŝin, kaj deziras al ŝi sukceson por la estonteco!

# Abduraĥman Junusov ŝatigis Dagestanon

Kadre de la prelegturneoj organizataj de la landa asocio Espéranto-France, la Lilla klubo akceptis Abduraĥman Junusov el Dagestano en majo: li vizitis Lillon, la ekspozicion pri Modigliani, kaj ludis dum vespero kun klubanoj. La 18$^{an}$ de majo li prelegis en MRES pri sia lando: jen ĉi-sube raportas Katja Boen.

⁂

En fora pasinteco homoj pensis, ke paradizo estis ĝuste en tiu loko! Dagestano estas belega lando, ĉefe interesa pro naturo: altaj montaroj, frukto-dona tero… En Dagestano estas ankaŭ stepoj kaj malgranda dezerto.



La lando estis tiel alloga, ke okazis multaj invadoj: nun kunvivas tie ĉirkaŭ 40 diversaj etnoj kun kvardeko da lingvoj el plej diversaj lingvaj familioj. Multe da legendoj celas klarigi, kiamaniere tiom da popoloj aperis en relative malvasta spaco. Dagestano estas mozaiko: tie troviĝas ekzemple popolo religie hebrea sed lingve persa (lingvo Farsi). Gazetoj aperas en 14 lingvoj. Por komunikiĝi homoj antaŭe uzis la araban, nuntempe la rusan.

La plimulto de la dagestananoj estas islamanoj; tie troviĝas la plej malnova moskeo en la mondo. Antaŭ nelonge aperis en Dagestano vahabismo, sed ĝi estas malpermesata pro ligoj kun terorismo.



Ĉiu vilaĝo havas propran produktaĵon. Notindas, ke irananoj eniris Dagestanon por lerni la arton fari tapiŝojn. Ekzistis interesaj kutimoj en vilaĝoj: ekzemple, kiam ekestis konflikto inter du viroj, se virino ĵetis sian kaptukon inter ilin (gravega ago!), la viroj nepre devis tuj paciĝi.

En Dagestano laboras pluraj neregistaraj organizaĵoj. La gazetaro estas sendependa, sed dum la lastaj jaroj estis murditaj 20 ĵurnalistoj kaj eĉ du ministroj pri komunikado.



Dagestano estas aŭtonoma respubliko de Rusia Federacio. Dum la 19$^{a}$ jarcento okazis tie grava milito kontraŭ la rusoj kaj Dagestano malvenkis. Dum la sovetia epoko la kondiĉoj estis iom pli favoraj tie ol en aliaj respublikoj.

Dagestano okupas unu el la plej malaltaj rangoj laŭ vivnivelo. Ĝi suferas pro ampleksa korupcio. Tamen homoj estas optimismaj kaj kredas je pliboniĝo de sia estonteco!

# Vizito en la Flandraj Ardenoj kaj Lessines

Dimanĉon la 24[an] de aprilo okazis la Tago de la Flandraj Ardenoj. Ĉi-jare ni vizitis la hospicon de Lessines en Valonio – nun muzeon – kun niaj flandraj amikoj.

Tiu hospitalo estis nomata "Nia Sinjorino kun Rozo" (*Notre-Dame à la Rose*) kaj tenata de la ordeno de la aŭgustenaninoj ekde la dek-tria ĝis la dudeka jarcento. Ĝi povis vivi en aŭtarcio dank' al siaj bienoj.

Rimarkinda estas la bona konservateco de tiu hospitalo. Unue, oni povas miri pri la diversepokaj konstruaĵoj: la gotika teretaĝo, la renesancaj superaj etaĝoj kaj la baroka kapelo. Poste, enirinte, ni ankoraŭ povis vidi ĉion pri la vivo de la malsanulejo, kaj spirita kaj materia: belegajn kolektojn de kirurgiaj iloj, farmaciaj materialoj, kuracaj plantoj konservitaj tra jarcentoj. Temas ne nur pri aĵoj, sed ankaŭ pri la tuta vivo de la hospitalo kaj la rilatoj inter la monaĥinoj, la malsanuloj kaj la ekstera mondo.

*Raportas: Daniel Mayeux*

NDLR. – De jaroj la Kortrejka Esperanto-klubo partoprenas en la Tago de la Flandraj Ardenoj. Matene naturfakulo gvidis la grupon en la natur-rezervejo de Zegelsem. La tagmanĝo okazis kadre de la Rendevuo de la Flandraj Natur-Asocioj kun multaj budoj por informiĝi kaj aĉeti diversajn lokajn produktaĵojn. La posttagmezan viziton de la hospitalo organizis Piet Glorieux, kiu ankaŭ brile buŝtradukis la klarigojn de la gvidanto.





## Kompletigu vian librokolekton!

Nia amiko Lucien Giloteaux el la Lilla klubo proponas senpage doni Esperantajn librojn. Grandan kolekton li ja posedas. Por scii pli pri la akireblaj libroj, kontaktu lin telefone: 03 20 24 75 11.

**KOLOFONO**

La ***Norda Kuriero*** estas la informilo de la Nordfrancia Esperanto-Federacio.

Redaktis: Katja Boen, Xavier Dewidehem.
Enpaĝigis: Xavier Dewidehem.

Ni invitas la federacianojn kaj la klubestrojn sendi informojn al la *Norda Kuriero* per la jena adreso: **kuriero@esperanto-nord.org**